

# star<sup>o</sup>★

Organo de Ĉeĥa Esperánte-Asocio

1971

8



K A J

FELIĈAN

NOVJARON

## ĜENERALAJ ELEKTOJ EN ĈSSR KAJ ĈEĤOSLOVAKA BALOT-RAJTO

Fine de novembro la ĉeĥaj kaj slovakaj civitanoj venadis al balotilaj urnoj en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la respubliko, plenumante sian unuarangan civitanan rajton. Venadis ĉiuj, kiuj per laboratingoj de siaj kapoj kaj manoj helpis al la partiaj kaj ŝtataj aŭtoritatoj kunsolidigi la politikan kaj ekonomian situacion en nia lando en la lastaj jaroj kaj fine, post la okjara intertempo, ebligis elekton de novaj reprezentantoj en ĉiujn popol-reprezentajn organojn.

Kiuj estas, nome, la ĉefaj principoj de la balot-rajto en Ĉeĥoslovakio, la ŝtato de la du egalrajtaj nacioj, la ĉeĥa kaj la slovakaj?

Tiu ĉi institucio estas unu el la fundamentaj trajtoj de la socialisma demokratio; ĝi rajtigas la civitanojn elekti siajn reprezentantojn kaj esti elektita. La aktivan rajton baloti havas ĉiu civitano de ĈSSR, kiu en la tago de la elektoj atingis sian 18an aĝojaron sen koncerno al sia nacia aŭ socia deveno, sekso, religio, okupo, kaj egale, ĉu li posedas ian havaĵon aŭ ne. Escepton faras sole personoj mense nekapablaj plenumi tiun ĉi taskon aŭ arestitoj. La rajton esti elektita havas ĉiu civitano, kiu en la respektivaj tagoj atingis la aĝon de 21 jaroj.

La ĉeĥoslovakaj balot-rajton karakterizas ĝeneraleco, egalrajteco, rekteco kaj sekreteco. Neniu burĝa ŝtato povas fieri ekzemple pri vere ĝenerala balot-rajto. La reganta klaso uzas kutime diversajn limigojn por direkti ilin kontraŭ laboruloj, kiel ekz. scipovon pri la konstitucio, havaĵposedon, aĝo-limon, balot-imposton k.s.

Sub la egalrajteco oni komprenas, ke ĉiu civitano havas nur unu voĉon kun la sama signifo kaj ke oni balotas laŭ la samaj kondiĉoj. Plue, la rekta balotado signifas, ke ĉiuj popol-reprezentaj organoj estas elektataj senpere de la balotantoj. Tio ebligas al la lastaj ekkoni siajn kandidatojn, ligi kun ili daŭran interkomunikon kaj post ilia elekto konstante kontroli ilian agadon. La sekreteco de la balotoj garantias al la civitanoj liberan decidpovon fordoni siajn voĉojn al la kandidatoj de la Nacia Fronto.

La rajton proponi kandidatojn havas la politikaj partioj kaj sociaj organizaĵoj, membroj de la Nacia Fronto. Tiaj partioj kaj organizaĵoj ekzistas en ĈSSR pli ol tridek.

Demokratia organizo de la elektoj baziĝas je amasa partopreno de ĉiuj civitanoj - partianoj aŭ senpartianoj - en la balot-preparoj, t.e. ĉe la ellaborado de la balot-programoj kaj selektado de la unuopaj kandidatoj. La Naciaj Komitatoj - popol-reprezentaj organoj en la regionoj, distriktoj, urboj kaj vilaĝoj - jam en septembro prezentis rezultojn de sia laboro ĉe la publikaj kunvenoj de la civitanoj rilate la laboron faritan kaj farotan.

Respondeco de la popol-reprezentantaro antaŭ la balotantoj neniel ĉesas post la tago de voĉdonado. La publiko rajtas iam ajn postuli bilancon pri ĝia agado, kiu devas esti konforma al la honora funkcio de ĉiu deputito.

La specifa trajto de de la nunaj elektoj en ĈSSR estis grandparta partopreno de la junularo kaj virinoj inter la proponitaj kandidatoj. Ankaŭ la reprezentantoj de la naciaj minoritatoj en nia ŝtato trovis sian adekvatan lokon tie.

La elekto-programoj de la Nacia Fronto havas firman fundamenton: realajn kaj efektivegeblajn konceptojn pri la ŝtata kvinjarplano. Ili prenas en konsideron ankaŭ libervolan aktivecon de ĉiuj sociaj organizaĵoj kaj de civitanoj ĝenerale.

En ilia plenumado partoprenas ankaŭ ni, la ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj, precipe sur la kampo de la porpaca laboro, en disvolvo de amikaj rilatoj inter laboruloj de ĉiuj landoj.

JUDr. Zdeněk R u s í n

---

ESPERANTISTO SLOVAKA festas ĉijare la 25an datrevenon de sia estiĝo. Ĝi akceptu sincerajn bondezirojn de sia malpli aĝa frato STARTO!



## Unu el niaj kandidatoj

en la ĵus okazintaj elektoj estis vicprezidanto de la EK en Vítkovice Josef HANZELKA, 63j. ~~ĉeĥa~~ ĉeĥa oficiisto, komunisto. Li estas funkciulo de la loka civitana komitato kaj deputito de la Distrikta Nacia Komitato.

## DUA LABOR-KONFERENCO DE INSTRUISTOJ

okazis la 6an kaj 7an de nov. en Babilono apud Domažlice (oko. Bohemio). Estas vere paradoksa hazardo, ke ĝuste en Babilono renkontiĝis homoj, kiuj tiel bonege komprenis unu la alian.

La partoprenantoj (entute 48) raportis pri siaj taskoj jam el la antaŭa konferenco en Třebíč. La unua tago estis dediĉita al la laboro kun infanoj, la dua (Daŭrigo sur la 8a pĝ.)

MEM-kunveno  
en Londono:

## POR LA EŬROPA SEKURECO KAJ PACO

La partoprenintoj de la publika MEM-kunveno, la 3an de aŭgusto 1971 en Londono, okupiĝantaj pri la problemoj de la eŭropa sekureco, alvokas ĉiuj esperantistojn kunlabori kun la ceteraj neesperantistaj organizaĵoj

- por la plievoluigo de samrajtaj rilatoj inter ĉiuj eŭropaj ŝtatoj, la pliintensigo de la kunlaboro, inkluzive la normaligon de la rilatoj inter la du germanaj ŝtatoj,
- por la pritrakto de la ekzistantaj ŝtatlimoj en Eŭropo kiel definitivaj,
- por la samrajta membriĝo kaj ampleksa kunlaboro de ĉiuj ŝtatoj en UN, UNESCO kaj aliaj internaciaj organizaĵoj,
- por la solvo de ĉiuj problemoj per paca intertraktado.

La partoprenintoj de la kunveno subtenas plej energie la okazigon de la konferenco pri eŭropa sekureco kaj kunlaboro, kiun ĉiuj eŭropaj ŝtatoj egalrajte partoprenu por preparoli ĉiujn problemojn lige kun la sekurigo de la paco kaj kunlaboro inter la eŭropaj ŝtatoj.

## KAMPANJO "ĈS. ESPERANTISTOJ HELPE AL LA BATALANTA VJETNAMIO"

alportis jam sian unuan frukton. Pravas tion la rendeta noj en Ústí n/L, kie la 27an de novembro okazis la IIa nordbohemia renkontiĝo. La partoprenantoj bonvenigis en sia rondo direktoron de la Informa kaj Kultura Centro de VDR en Prago, k-don P h a m d u o n g, kiu disponigis al ER interesan materialon por la okazonta ekspozicio pri Vjetnamio.

La kunvenon salutis la prezidanto de ĈEA Josef Vítek kaj la prezidanto de la Distrikta Packonsilantaro k-do Jílek.

Kultura parto de la programo estis dediĉita al s-ro Jiří Kořínek, antaŭe longe festinta sian 65-jariĝon. La poemon "Paco" de F. Bránslav en la traduko de la jubileinto deklamis V. Novobilská. Kontribuis ankaŭ M. Smyčka kaj V. Kvarda, kantistoj de la operejo en Ústí n/L. La programon gvidis la vicprezidanto de ER d-ro V. Novobilský. (k)

LA ESTRARO DE LA FORPACA SEKCIO (MEM) DE ĈEA kunsidis la 25an de oktobro en Prago. Ĝi pritraktis definitivajn tekstojn de la alvoko "Ĉs. esperantistoj al la batalanta Vjetnamio" kaj decidis prepari la agadplanon de la sekcio por 1972. La ĝisnuna estraro de FS estis kompletigita per jenaj komitatanoj de ĈEA: arĥ. J. Drlik, M. Josková, O. Knichal, ing. F. Sviták, D. Zdvihalová kaj M. Juřenová, EK Praha.

La plej giganta kaj pompa mondekspozicio iam okazinta estis tiu en Osako.

La plej granda urbo en la mondo estas Tokio kun siaj dekunu milionoj da loĝantoj.

La plej rapidan ekspreson prezentas Tokaido Line, kiu komunikigas tiujn ĉi du urbegojn japanajn

kaj kiu veturigis nian gaston al Numadzu, la elfinpunkto por Fuji, la plej alta monto japana.

Do, ek al la nova rekordo!

"Ĥh, kaprica monto ĝi estas", grumbletas sinjoro Tanaka, en kies gastema hejmo restadis versajne ne unu kandidato de la grimparto. Li tuj ekiras traserĉi ŝrankojn por havigi varman vestaĵon. Sufoka varmego kaj humida aero senpovigas en la somera sezono ĉiun eksterindigenon, sed forgasigas la novbakitajn montaranojn pri tiu en la alteco de 3800 metroj. Sinjoro Tanaka, kiu tre pene moviĝas - malfeliĉa glitfalo foje sur Fuji paralizis lin je ambaŭ kruroj - alportas bezonatan ekipon: paron da sablorezistaj ŝuoj, ventjakon, dikajn struipojn kaj elektran lampeton.

Antaŭ ol konkeri la "sanktan" monton oni devas "oferi" al dioj ĉe la submontara preĝejo - trifoje aplaudi kaj ĵeti kelkajn monerojn en lignan ujon. Por tiu ĉi bagatela sumo la Fuji-patromoj protektos ĉiun survoje.

La pinton de Fuji, kiu estas konsiderata unu el la du plej belaj konusaj vulkanoj, ĉiujare surpasas pli ol ducent mil pilgrimantoj. Atinginte la kvinan ŝtupon, meze de la monto, oni postlasas tie sian aŭtomobilon kaj en la butikoj aĉetas tradician bastonon kun sonoriloj, nepran akcesoraĵon de la Fuji-turisto.

La nomo de Fuji, kiel la japanoj karesse nomas sian amatan simbolon nacian, devenas de la praajna (1) vorto "fajro", kiun la vulkano elspulis lastfoje antaŭ 265 jaroj, ege konsterninte la loĝantaron de la unu-miliona Edo (Tokio). Lastatempoj, ĝia faŭko fariĝas tombejo de memmortigantoj.

Sed Fuji scipovas disipi ankaŭ siajn ĉarmojn plej variajn - foje ĝi vualigas per densa nubaro, foje ĝia ĉapeto ekbrilas de sunradioj, Fuji simple paradas kaj fanfaronas per sia ravanta povo ĝis kiam elĉerpas ĉiujn siajn tridek ses aspektojn, kiujn siatempe tiel majstre pentris la fama Hokusai (2).

Feliĉe tiun tagon la monto montris la vizagon planan de favoro: la nokta fir-

O. K N I C H A L

## LA SUNLEVIĜO SUR FUĜI

(el la preparata raporto pri Japanio)

### Rondeta vivo

BRNO - Ĉirkaŭ 150 impresaj afiŝoj invitis la publikon al E-kurso, kiu jam malfermiĝis komence de oktobro sub la gvido de J. Vondroušek kaj kun partopreno de 21 personoj. - Allogan ekspozicion sur la Placo de Libereco preparis s-ino prof. E. Hliněnská. - Pri sia lando prelegis en EK 28.9. s-ro G. du Temple el Kanado.

JABLONEC - Regulaĵ klubaj kunvenoĵ okazas lunde je la 19a horo /Jiráskova str.9/. Konversacian kurson gvidas s-ro Řehoř. Antaŭ nelonge komenciĝis kurso por komencantoj /gvidas s-ro Hrnčíř/

LIBEREC - La "Naiva Teatro" preparas E-surscenigon de la "Diluvo de la mondo", teatraĵo de la

ĉeĥa klasikulo V.K. Klicpera. Esperantiĝis L. Špína, la tekstojn de la kantoj tradukis J. Kořínek. La unua prezentado estas okazonta la 18an de februaro 1972.

La 27an de oktobro estis malfermita E-fako de la loka Scienca kaj popola biblioteko.

OLOMOUC - Solena vespero okaze de la 60jara jubileo de la fondiĝo de EK okazis la 11an de dec. en la kunvenejo "Žerotín".

PARDUBICE - Al la societa vespero, okazonta sabate 5.2.1972 je la 19a horo en la granda salono de la Kulturdomo en Dukla, invitas ĉiujn la komitato de la loka grupo /LG/ de ĈEA.

TABELO DE ENHAVO DE "STARTO" ( oktobro 1968 - decembro 1971 )

/la unua cifero signifas numeron, la dua paĝon/

R o n d e t a a g a d o

Brno 5/5/69; 2/3, 3/2, 4/3/70; 1/3, 3/2, 4/3, 5/2,  
6/6/71; 8/4/71 ;  
Bor u Tachova 5/2/70; 1/3, 3/2, 4/5, 6/6/71 ;  
Bučovice 4/4, 5/5/69; 5/2/70 ; 3/2, 5/2/71 ;  
Č.Budějovice 3/2/71 ;  
Č.Dub 1/7/69 ;  
Domažlice 1/3/71 ;  
Havl. Brod 1/5/70 ; 6/3/70 ;  
Hradec Králové 3/2, 4/3/70 ;  
Chocen 1/3/71 ;  
Jablonec n/N. 1/7, 3/8/69 ; 5/2/70 ; 1/3/71, 8/4/71 ;  
Kopřivnice 4/3/70 ; 2/2/71 ;  
Kyjov 6/3/70  
Liberec 3/2, 8/4/71  
Mělník 3/8, 5/5/69 ; 5/2/70 ; 3/2, 3/8, 4/2, 6/6/71;  
Mor.Budějovice 1/7/69 ;  
Místek 3/2/71;  
Nová Paka 1/7, 3/3/69 ;  
Olomouc 2/6/70 ; 8/4/71 ;  
Opava 1/3, 3/2/71 ;  
Ostrava-VŽKG 1/7/69 ; 2/3, 3/2, 6/3/70 ; 1/3, 3/2, 4/2/71;  
-Poruba 4/4/69 ;  
-Vítkovice 4/3/70 ;  
Miletín 4/3/70 ;  
Pardubice 6/3/70 ; 8/4/71 ;  
Píseň 4/7, 6/3/70 ; 3/2, 7/7/71 ;  
Plzen 5/2/70 ; 3/2/71 ;  
Poděbrady 5/5/69 ; 1/3, 5/2/71 ;  
Praha 1/2, 1/9/68 ; 4/4, 5/5/69 ; 2/3, 3/2, 5/2/70;  
2/2, 3/2, 4/2, 4/6, 6/6/71 ;  
Semily 1/7/69 ;  
Svitavy 3/8, 4/4/69 ;  
Šumperk 1/7/69 ; 3/3, 4/2, 7/7/71 ;  
Tábor 1/3/71  
Třebíč 2/6/68 ; 1/3, 7/7, 8/5/71 ;  
Třebová Č. 1/5/70 ; 1/3, 2/5/71 ;  
Třinec 4/2/71 ;  
Teplice 3/3/71 ;  
Ústí n/L. 2/6/68 ; 1/4, 6/6, 7/7/71 ;  
Vsetín 2/6/68 ; 1/7, 5/5, 6/2/69 ; 4/3, 6/3/70 ; 2/2,  
3/3, 5/2/71 ;  
Vyškov 1/4/70 ;

C E A - la sekretario 1/2, 9, 2/7/68 ; 1/2, 3/7, 10,  
4/10, 5/4, 10, 6/1, 2, 3, 5/69 ; 1/7, 2/4, 6, 3/8, 4/2,  
5/2, 5, 6/6/70 ; 1/6, 2/5, 3/3, 4, 8, 4/7, 5/2, 8, 6/7,  
7/6/71 ;  
- plenkunsidoj de CK 2/5/68 ; 5/1/69 ; 2/2, 4/2,  
6/2/70 ; 3/1, 7/2/71 ;  
- kongresoj 2/1-5/69 ;

Renkontiĝoj 3/8, 5/7, 6/4/69 ; 1/4, 4/4,5, 6/5/70 ; 2/4,  
 4/2, 5/4, 7/3,4,5/71 ;  
 Junularo 1/7, 2/8/68 ; 2/6, 3/17, 4/12, 5/11/69 ; 4/4,  
 6/7, 7/7,12/71 ;  
 Instruistoj 2/7/68 ; 1/8/69 ; 1/4, 3/5, 6/4/70 ; 1/4, 2/3,  
 3/3, 4/5, 5/5, 6/6, 8/3/71 ;  
 Fervojistoj 3/8, 4/7, 5/5/69 ; 1/2, 5/4, 6/6/70 ; 3/4,5/6,  
 7/11/71 ;  
 M E M 1/3, 3/3, 4/7, 5/6/70 ; 7/5, 8/3/71 ;  
 Teknikistoj 1/4, 3/2, 6/4/70 ;  
 Blinduloj 2/3, 5/3, 6/4/70 ;  
 Skoltoj 1/8/68 ; 3/3, 4/8/69 ; 2/7/71 ;  
 S E T 1/3, 4/6/69 ; 2/2, 4/4, 5/3/70 ; 5/4, 6/5/71 ;  
 Informado 1/6/68 ; 1/3, 5/9,7,10/69 ; 3/5,6/70, 4/2/70 ;  
 2/5, 3/9, 8/7,8/71 ;  
 Lernolibroj kaj vortaroj 6/3/69 ; 1/5, 2/7, 3/7, 4/3, 5/4,6/70,6/7/70 ;  
 Publikaĵoj diversaj 3/8/69 ; 1/6, 2/7, 3/7, 4/5,7,8, 5/4,7,6/3,8/70  
 1/8, 2/2, 6/2/71 ;  
 Recenzoj 1/8/68 ; 2/5/69 ; 4/7, 5/7, 6/3/70 ; 1/7, 3/11,  
 5/5, 7/8, 8/6/71 ;  
 Samideana kroniko 1-6/69 ; 1-6/70 ; 1-8/71 ;  
 Korespondado 2/10/68 ; 3-6/69 ; 1-6/70 ; 1-8/71  
 Leteroj 3/3, 4/5/69 ; 1/8, 2/5, 4/8/70 ; 3/12, 6/2,  
 7/9/71 ;  
 Enketo 1/4, 3/4, 6/3/69, 7/9/71 ;  
 Beletro 1/10/68 ; 3/11, 3/18, 5/9/69 ; 3/6, 4-5/8/70 ;  
 3/6, 7/10, 8/4/71 ;  
 Lingva konsilanto 4/6/70 ; 3/10/71 ;  
 UEA, UK 1/3/68 ; 4/1, 6/6/69 ; 1/2,6, 2/2,6, 3/2,4,6,  
 4/1, 5/6, 6/6/70 ; 2/2,3, 3/3, 4/5,6, 5/1,7,  
 6/3/71 ;  
 Movado en Slovakio 3/2,8/69 , 5/5, 6/4,6/69 ; 1/5, 3/3, 4/5,7,6/3/  
 70 ; 1/8, 3/5, 6/8/71 ;  
 Movado ekster-landa 3/9, 4/7, 5/8,10, 6/5/69 ; 1/5, 2/2,4, 3/5,4/5,  
 7, 5/4,6 6/5-8/70 ; 1/5, 2/3,6 3/5,9,12, 4/4,  
 6,7, 5/5, 6/4,8 7/6, 8/6/71 ;  
 ESPERANTO kaj bibliofiloj (5/7/71), fakoj (5/8/69), filatelio  
 (2/3/70), gazetaro (2/5,10/68 ; 2/8, 6/8/71),  
 geologio (2/4/68), homrajtoj (2/2/68; 6/7/69),  
 intersteno (3/9/69), Komenio J.A. (3/1, 6/5/70),  
 komerco (2/10/68), kontraŭuloj (6/2/70), labor-  
 istaro (4/4, 5/6/70, 5/3, 7/6/71), lingvoproble-  
 mo (2/9/68), nacia lingvo (5/7/70; 1/5/71),paco  
 (1/3/70 ; 7/7/71 ), poŝtistoj (3/6/70), radio  
 (4/7/70),sociologio (6/7/70),speleologio (8/5/  
 71), sciencistoj (2/3/68), Verne J. (1/8/70),  
 Lenin V.I. (1/3/70) ;

mamento estis komplete senmakula kaj la foraj urboj trembrilis el la distanco de kvindek-kelkaj kilometroj. Cent-, ducent-kapa vico serpentumis al la supro. Pli kaj pli alten levigis lanternoj en nevideblaj manoj, kvazaŭ lampirara moviganta laŭlonge de la deklivo, prilumata de la plenluno.

Tri ĉevalrajdistoj preterpasas kaj ĉe la ĉevalvostoj sin tenas tri aliaj "kunvojagantoj" lasante sin treni supren. Apude juna japanino anhelas pro alta sangopremo. La kompatindulino akceptas la helpon kaj metas siajn brakojn ĉirkaŭ la kolojn de la du viroj - gasto kaj lia akompananto, sinjoro Ibuka, instruisto el Numadzu. En la plej proksima ripozejo ŝi preskaŭ rulfalas duonsvene ĉe la pordo, sed lastmomente, kvazaŭ rememorinte pri io grava, penegle levigas kaj kapklinas - jen dankesprimo pro la helpo.

Sed nun oni jam hastas al la lasta ŝtupo, ĉar la mallumo ĉirkaŭe fariĝas ĉiam pli kaj pli travidebla. Komence nur melodias la blueta ĉielo. Iom post iom la oranga koloro kantsonoras. Tujsekve eksonas glorvenka floralo de la nova tago.

"Ĝorajo", komentas sinjoro Ibuka - jam la trian fojon de sur tiu ĉi loko.

Ĉar tiu fascinanta japana vorto signifas "sunleviĝo". Kaj la sunleviĝo sur Fuji estas momento neforgesebla por la tuta vivo.

Maljunulino jam-jam atinganta la lignan barilon subite mallevigas kiel subhakita arbo kaj sternas sin sur la lafa grundo pro elĉerpiĝo. La geknaba paro restas senmova en la ĉirkaŭbrakumo vid-al-vid al la suno.

Kaj pri kio rezonas turistoj vestitaj en kaki-uniformoj - usonaj soldatoj el Okinavo? Venis da ili preskaŭ la tuta roto. Malŝatataj sur la insulo pro sia sovaĝeca konduto al la tieaj virinoj ili nun preskaŭ time rigardas kaj salutas preterpasantojn. Povas esti, ke ĝuste ili asistos en la proksimaj manovroj ĉe la piedo de Fuji, kaj la trankvilon de tiu ĉi paca mondanĝulo, kie ĉirpas la griloj, denove rompos pafado de armiloj.

Sed nun ili ŝajnas esti tute kviesaj kaj ravite gapas al la sangoruĝa globo ...

- (1) ainoj - membroj de la indiĝena raso nuntempe loĝantaj en Hokajdo, la plej norda parto de la japana insularo.
- (2) Hokusai, pentristo, vivis inter 1760 - 1849.

**PŘÍBRAM** - Preskaŭ 500 vizitintoj rigardis la E-ekspozicion /24.-28.10./, per kiu la membroj de ER festis la dekjaran ekzistadon de sia Rondeto. La ekspozicio helpis gajni novajn interesatojn por E - kursoj.

Jam la trian datrevenon de sia malkovro en la groto de Koněprusy /meza Bohemio/. Ĉar inter la esploristoj ĉeestis tiam ankaŭ du esperantistoj, oni decidis nomi la nove malkovritan subteran ejon "Halego d-ro L.L.Zamenhof". La nomo de la aŭtoro de Esperanto konatiĝis tiel inter la ĉeĥaj speleologoj kaj por ĉiam eniris la historion de la Ĉeĥa Karsto.

**TŘEBÍČ** - La klubanoj jam fer-

vorege laboras por la venonta SET en Lančov. La nova adreso de IG ĈEA estas : Český esp. svaz, místní skupina, p.schr.72.

### Samideana kroniko

La 9.11.mortis en Brno s-ino Zdenka K a m a r ý t o v á, 80j vidvino de prof.d-ro St.Kamarýt, la eminenta ĉeĥa E-pioniro.

Niajn vicojn forlasis 16.9.F. S t o k l a s a, prez. de EK ĉe Přerovské strojírny.

En Šternberk mortis 20.10.Jan P ř í b o r s k ý, 65j.

Prof. Vladimír W u r m forpasis en oktobro en Č.Budějovice.

Honoron al ilia memoro !

## Foliumante en PM (2)

Esperantigante la loknomojn la tradukintoj sekvis du ĉefajn principojn: imiti originalan fonetismon (1) kaj konservi tian skriban bildon de la loknomo, ke ĝi estu plejble proksima al ties originala skribmaniero (2).

Ĉe l'esperantigo de la anglaj vortoj la respekto al la skribmaniero estis grandparte preferinda, ekz. Fretaŭno (el Freetown), Grenviĉo (PIV) el Greenwich. La germanan -ch- oni transdonas kiel -h- : Munĥeno el München. Kaj la vortfino -ion ĉe la franclingvaj nomoj transiris simple kiel -io : Reunio (PIV) el Réunion. Kvankam PIV akceptas la latinidan pluralan finaĵon -es,-as,-os en la hispanaj nomoj Celebeso, Karakaso, PM kreas la E-nomojn sen tiu finaĵo : Celebo, Karako.

Ĉe la azbukaj nomoj, plejparte ruslingvaj, la mekanika transliterigo povas kaŭzi gravajn erarojn, ekz. Oĥocka maro (PIV) anst. Oĥotska maro ; temas ja pri substantivigita adjektivo al la tribnomo Oĥot. Dezirinda estis ekz. ellaso de "j" en ĝenaj konsonant-grupoj : Cimlansko, ne Cimljansko ; alioke kon-servigas la originala jotacio : Ljuberco ks. PM estas unua pli ampleksa provo pri esperantigo de la rusaj nomoj.

Danĝeran teron prezentas la ĉinaj loknomoj. Ĉina esperantisto skribas ekzemple Guangdong, sed prononcas Kuantun. PM submetis sin al la sistemo ellaborita de Ĉina E-Ligo kaj sukcese praktikata en la gazeto "El Popola Ĉinio", sed ĝi kuraĝis - diference de la ĉina sistemo kaj de la iom nekonsekvencaj PIV-praktikado - anstataŭ la neasimilitajn formojn per asimilitaj. La formoj kiel Pekino, Sanhajo eniris ankaŭ PM.

Koncerne arabajn nomojn kun tradukebla signifo PM konservas laŭsencan tradukadon, ekz. Blanknilo por Bahr el Abiad. Oni akceptis ekzemple internaciajn formojn Eŭfrato kaj Tigriso. Plurvortaj originalaĵoj transformiĝis en PM al kunmetaĵoj : Daresalamo k.a.

LANDNOMOJ. La plej granda nombro de ili estas tiuj kun primitivaj (simplaj) radikoj : Islando, Nederlando, Cejlon, Angolo, Dahomeo, Kubo, Peruo ktp. Al- okaze oni devas nomi teritorion laŭ monto, rivero, lago aŭ urbo : Alĝero (urbo) kaj Alĝerio (lando) ; Nigerio kaj Nigero (rivero). Se en Pacifika oceano oni nomas insulmondon Oceanio, kial ne nomila kontinenton en la antarktaj regionoj Antarktio ? Tamen PM konservas tradiciajn nomojn de la ŝtatoj, origine baptitaj laŭ samnomaĵ fluoj : Urugvajo apud Urugvaja rivero...

La nomon de lando el nomo de enloĝantoj PM kreas per la pseŭdosufikso -io, do : Aŭstrio, Britio, Ĉeĥoslovakio, Germanio, Ĉinio, Hindio, Japanio. La finaĵon -lando oni lasis pro superreganta tradicio ĉe Danlando, Irlando, Pol- lando, Finlando, kvankam la formoj kun -io estus tute laŭsistemaj. Ne estis adaptita la gentnomo Kimroj (Kimrio) anst. la internacia Wales, Esp. Valeso.

PM sendube vekos kritikojn el diversaj flankoj, tamen oni devos konsideri, ke ĝi estas rezulto de kunlaboro de multaj specialistoj, la verko siaspece senprecedenca, ampleksante larĝan kampon de geografio kaj geologio kaj atingante eĉ la teron de spacveturado. (kul)

**Verda  
agentejo  
raportas**

HANOJO - Amaskunveno okaze de la "Internacia tago de solidareco kun la japana popolo" (6.8.) ĉeestis la membraro de VPEA la 11an de aŭg. • SOFIO - En "Bulgara Esperantisto" (8/1971)

oni legas artikolon "Manpremo kun heroa Vjetnamio", kiu aperis en "Starto", (4/1971) • ROTERDAMO - En la novembro eldono de la UEA-revuo ESPERANTO K. Kalocsay laŭde aprecas la tradukon de "Apokrifoj" de K. Ĉapek: figuro de Josef Vondroušek. • PORTLANDO - Al la 57-a UK jam aliĝis (ĝis 25.10) 244 personoj el 33 landoj, tri el ĈSSR. La TEJO kongreso 1972 oni invitis al Pol- lando.



## Ŝtopu la buŝegon de la krokodiloj !

Per tiu ĉi impresa titolo surskribas sian kontribuadon N.Nikolov el Sofio, ĝenerala sekretario de "Monda Esperanto-Turismo". Li skribas pri la ĉijara Ora Esperanto-Ferio en la bulgara restadejo Pamprovo, kie multaj partoprenintoj preferis paroli nacilingve au "krokodili". Tio inspiris la novan esperantiston - Genadi el Soĉi - pentri grandan verdan krokodilon kun malfermita buŝego kaj akompani la pentraĵon per la vortoj, kiuj legiĝas en la titolo.

En ĉiuj landoj, daurigas Nikolov, oni plendas, ke estas multe da eternaĵ komencantoj kaj ke konsiderinda nombro da esperantistoj preskaŭ ne kuraĝas paroli Esperante, pri kio multe kulpas diversaj funkciuloj, kiuj mem uzas la nacian lingvon. La preteksto, ke ekzistas novlernantoj, kiuj ne kapablas ĉion kompreni, estas malgusta kaj oni devas ĝin rebati. Alie, la eterne novaj esperantistoj plimultiĝos kaj la ĝenerala lingvoscio ne nur ne kreskos, sed povas konsiderinde malkreski.

Dum la Ora E-Ferio, kiu okazos en 1972, oni planas iniciatojn, kiuj ebligus nur Esperantan interparoladon. Ekzemple samlingvanoj ne loĝos kune, estos disdonataj premioj al la plej favoraj E-parolantoj, la deĵorantoj estos instigitaj lerni minimume dudek frazojn en la internacia lingvo per interkompreniĝi kun la feriantoj.

Ŝtopi la "buŝegojn" de la "krokodiloj" ie ajn en la vasta Esperanto-mondo, ĵen, unu el la plej gravaj devoj de ĉiu Esperanto-batalanto, konkludas la aŭtoro.

### DUA LABOR-KONFERENCO DE INSTRUISTOJ (Daurigo de la 3a paĝo)

al la problemoj de la Lingva Komisiono, korespondaj kursoj k.a. Ĉar partoprenis sole spertaj Esperantistoj kaj ĉeestis ankaŭ alilandanoj, ĉiuj traktadoj okazis en la Internacia Lingvo.

La sabata vespero estis dediĉita al altnivela amuzo, konsistanta el ĥodaj poezio kaj prozo, kantoj kaj sakfajfista muziko. Pri la sukceso de tiu ĉi vespero pleje meritas Vuk Ehtner, la eminenta kantistina triopo "Ĥoda trio" kaj "Duo de ĥodaj sakfajfistoj", artismaj kunlaborantoj de la Radio Pilzenjo, kaj s-ino Ant. Ehtnerová per rava rakontado en la bela ĥoda dialekto.

Al la sukceso de la tuta konferenco pleje kontribuis D-ro V. Novobilský, K. Kraft kaj V. Ehtner per modela preparo kaj gvidado, kaj k-do V. Franěk, estro de la Kultura Centro en Domažlice, kiu havigis la brilan konferencojn kaj senpage gastigis ĉiujn konferencanojn en hotelo Praga. (Fx)

TIUN ĈI NUMERON RICEVAS, kiel modestan donaceton sub la kristnaskan arbon e s c e p t e ankaŭ ĉiuj membroj de ĈEA pagintaj sian membrokoton en la kategorioj D au E. Ili ĉiuj povas jam nun pagi plenan kotizon (48 au 24 Kčs) por 1972 kaj tiel garanti al si regulan ricevadon de STARFO. Al ĉiuj legantoj kaj fidelaj amikoj deziras sukcesan novan jaron la estraro de ĈEA kaj la redakcio mem!

KUN ĈEĤOJ kaj precipe kun ĉeĥinoj dez.kor. mezaĝaj membroj de la E-societo "Flamo", Toruń 1, skr.16, Pollando. (Noto de la red. : respondu gustatempe, por ke la f l a m o ne estingu ! ).

LA BIBLIOTEKO DE E K PRAHA disponas pri granda kvanto da nekompletaj jarokolektoj de la plej diversaj E-gazetoj el la tuta mondo por s e n p a ĝ a d i s d o n o al E-grupoj kaj unuopuloj. Oni postulos nur efektivajn sendokostojn. Bv. turni vin al la bibliotekisto A. Zmeškal, EKP, p.k.1069.

STARFO - eldonas Ĉeĥa E-Asocio, p.k. 8, Praha 2. Aperas dufoje kvaronjare. Respondeca redaktoro O. K n í c h a l. Redakta komitato : ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. Abonebla sole por la membroj de ĈEA. Dohlédaĉi poŝta Praha 07, snižený pošt. poplatek povolen ĤP Praha j. zn. P/1 - 2283/1971 dne 6.5.1971.